

novembro 1968

61-a jaro

n-ro 756 (11)

esperanto

oficiala organo de
universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



**POR ILI:
INTERPRETO -
SED POR LA
POPOLAMASOJ?**

Vi trovos

en tiu ĉi novembra eldono de "Esperanto" la akcenton sur la eksteraj rilatoj de UEA: kun Unesko (p. 157, 160) kaj kun aliaj internaciaj organizaĵoj (p. 158-159). La Jaro de Homaj Rajtoj, 1968, jam proksimiĝas al sia fino; sed la insisto de UEA pri egaleco ankaŭ de rajtoj lingvaj, denove evidenta sur la sekvantaj paĝoj, restas kiel firma principo de la linio de la Asocio. Interparolo kun prezidanto Jonas de Aŭstrujo (p. 161) montras alian flankon de niaj eksteraj rilatoj.

Dum la venontaj monatoj "Esperanto" aperigos ĉiujn unua-premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj 1968. Kiel unua aperas sur p. 162-163 la venkinta verko en la branĉo Originala Prozo.

Aliloke oni trovas la junularan rubrikon de TEJO sub nova redakto de Robert Lloancy, kies kunlaboron ni kore bonvenigas.

La kovrilo

Prezidanto Bourguiba de Tuniso jam ekridetas ĝentile (kvankam iom streĉe) al U Thant, ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj – kvankam li ankoraŭ restas senkomprena pri lia ŝerco, ĝis la interpretistino de UN (Yvette Simond) ĝin tradukos francan. U Thant ne scipovas la francan; Bourguiba ne la anglan. La sceno estas el lunĉo ĉe UN en 1968. (Foto: UN Secretariat News)

Enhavo

- 157 Internacia lingvo rezistata (Sadler)
- 158 Protesto de UEA pri lingva diskriminacio en konferenco
- 159 Pedagogia konferenco pri Homaj Rajtoj (Pickel)
- 160 Informoj de CED
Nekrologo Ploussu
- 161 Akcepto de Prezidanto Jonas
- 162 Morto de la poeto (Szabó) – Belartaj Konkursoj 1968
- 164 Recenzoj
- 165 Komuniko de SAT pri Plena Ilustrita Vortaro
- 166 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 167 54-a Universala Kongreso, Helsinki, Finnlando, 1969
- 168 La Juna Vivo
- 170 Esperanto en radio
Belartaj Konkursoj 1969 (Regularo)
Memoriga kalendaro
- 171 Oficiala informilo n-ro 417: Nova granda donaco
- 172 Anoncetoj

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 25,— gld.). Unuopa ekzemplero: 1,— gld.

Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estrarado de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano por diskonigo de la agado de UEA: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

Estrarano pri turismo: S-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

Estrarano pri lernejoj: S-ro J. Toczyski, skr. p. 57, Gdańsk 1, Polujo.

Estrarano pri financoj: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estrarado de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

INTERNACIA LINGVO REZISTATA

Negativa sinteno de Unesko-Sekretariato

Du jarojn post la Skandinavia Propono, ke Unesko esploru la bezonon de internacia lingvo, nun ankaŭ Hindujo levis la demandon pri la lingva problemo antaŭ la Organizaĵo de UN pri la Edukado, Scienco kaj Kulturo. Antaŭvideble, la Sekretariato de Unesko denove reagis per negativa "Noto", kies celo evidente estas: eviti diskuton pri la demando kaj entombigi ĝin. Ĉi-sube ni analizas la proponon de Hindujo kaj la reziston al la ideo de internacia lingvo, ankoraŭfoje montratan en la "Noto".

Ĉiun alternan jaron okazas en Parizo nova Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko kun la tasko difini la ĝeneralan estontan laboron de tiu Organizaĵo. La ĉi-jara — 15-a — Sesio komenciĝis la 15-an de oktobro. Antaŭ la Konferenco troviĝas rezoluci-propono de Hindujo (Hinda Unio) pri "komuna skribsistemo por interligi la popolojn". La plena teksto de la propono aperas sub la rubriko de CED, sur p. 160.

La lingva problemo de Hindujo

Pro la unika karaktero de la lingva problemo en Hindujo, kie la popolojn disbaras unu de la aliaj ne nur la diverseco de lingvoj sed ankaŭ la multeco de la skribsistemoj uzataj en la lando, la rezoluci-propono eble ne estas tre bone adaptita al la monda bezono, nek ĝi estas tre logike konstruita. Ĝi konstatas la ŝarĝon de lernado de pluraj lingvoj kaj skribsistemoj, sed ĝi proponas solvon por nur unu el tiuj problemoj, nome tiu de la skribsistemoj.

Kvankam ankaŭ la demando de unuecigo de skribsistemoj estas tre grava, memkompreneble la demando de komuna lingvo multe pli rekte rilatas al la "bezono... interkomuniki pli facile en internaciaj kadroj". En sia esenco, do, la hinda propono multe similas al la propono de kvin skandinaviaj ŝtatoj farita en 1966 (vidu "Esperanto", 1967, januaro, p. 7). Esence, ĝi konstatas la ekziston de lingva problemo en la mondo kaj proponas serĉi solvon.

La sinteno de la Sekretariato

Al la skandinavia propono ("konsideri objektive la bezonon kaj eblecon de internacia lingvo") la Ĝenerala Direktoro de Unesko siatempe respondis, ke "la akcepto de internacia lingvo estas plejparte demando politika, kiu tuŝas la suverenecon de la Ŝtatoj. Pri tiu ĉi propono estus do kompetenta la Ĝenerala Konferenco..." Efektive, la Ĝenerala Konferenco pritraktis la proponon nur en la Programkomisiono, kiu pro manko de tempo redonis la demandon al la Ĝenerala Direktoro. En la Provizora Programo kaj Buĝeto por 1969-70 la Ĝenerala Direktoro eĉ ne unu vorton skribis pri la demando de internacia lingvo.

Ĉu sama sorto trafos nun la hindan proponon? Ĉi-foje la Ĝenerala Direktoro asertas, ke "kia ajn formo de internacia agado ŝajnas tute ne diskutebla" (vidu la plenan tekston sur p. 160). Per letero de 15 oktobro 1968, UEA atentigis la Ĝeneralan Direktoron de Unesko pri du ĉefaj misprezentoj en lia "Noto" al la hinda propono.

Unue, ne estas vere, ke "je multaj okazoj en la pasinteco... oni petis la Organizaĵon antaŭenigi la disvastigon de artefaritaj lingvoj". La Peticio al UN en 1950, transdonita samjare al Unesko, temis pri unu klare difinita lingvo, nome Esperanto. La Propono al UN, prezentita en Nov-Jorko en 1966, restis ĝis hodiaŭ en la manoj de la Sekretariato de UN, sekve ne povas esti unu el tiuj "multaj okazoj" kaj en ĉiu okazo ankaŭ ĝi temis nur pri Esperanto.

Respekto por kultura diverseco

Due, ne aperas el la rezoluci-propono, ke "oni celas anstataŭigi per novaj sistemoj la lingvojn aŭ skribsistemojn, kiuj formas esencan parton de la kultura heredaĵo de la diversaj nacioj", kiel aludas la Ĝenerala Direktoro. Ĉar, male, temas pri unu "komuna skribsistemo" (kaj, supozeble, komuna lingvo) "por interligi la popolojn" kaj por "interkomuniki pli facile en internaciaj kadroj", estas klare, ke la propono neniel konfliktas kun la fundamenta principo de respekto "por la diverseco kaj originaleco de la kulturoj", enskribita en la Statuton de Unesko.

Svingante tiun ĉi principon kiel sanktan flagon, la Sekretariato komplete kaŝas la fakton, ke la hinda propono estas perfekte konforma al unu el la bazaj celoj de Unesko, ankaŭ ĝi enskribita en la Statuton, nome "internacia kunlaboro por malfermi al la popoloj de ĉiuj landoj aliron al la presitaj kaj publikigitaj materialoj produktitaj de kiu ajn el ili".

La fenomeno ne estas nova. Malantaŭ la fasado de pia respekto por la naciaj lingvoj kaj kulturoj jam delonge kolektiĝas la fortoj de kultura imperiismo kaj aliaj interesoj malamikaj al la ideo mem de lingvo internacia, kiu sola povas garantii la egalrajtecon de la lingvoj kaj kulturoj de ĉiuj nacioj.

PROTESTO DE UEA PRI LINGVA DISKRIMINACIO

en konferenco de NRO pri Homaj Rajtoj



Jaro de
Homaj Rajtoj

La kvarpersona delegacio de UEA ĉe konferenco de internaciaj ne-registaraj organizaĵoj (NRO) pri la Homaj Rajtoj, kiu okazis en la Domo de Unesko en Parizo meze de septembro, forlasis la konferencon por montri sian proteston kontraŭ malobservo de la Homaj Rajtoj en la sino mem de la konferenco. La konferenco rifuzis akcepti la principon, ke ĉiu delegito rajtas paroli en sia propra lingvo, se li mem prizorgas la interpretadon en unu el la laboraj lingvoj.

Reprezentantoj de 118 ne-registaraj organizaĵoj, kiuj havas konsultajn rilatojn aŭ kun Unesko aŭ kun ECOSOC, kunvenis en Parizo en septembro por internacia konferenco okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj 1968. Inter la 275 partoprenantoj estis ankaŭ 4 delegitoj de UEA: prof. Lapenna, d-ro Sadler, s-ro Jean Thierry kaj f-ino J-M. Liouville.

Anticipe al la konferenco, la Gvida Komitato dissendis diversajn dokumentojn, inter kiuj troviĝis "Propono pri Proceduraj Reguloj" kaj alia dokumento sub la titolo "Ĝeneralaj Informoj". Mirige, la Komitato enmetis la demandon de lingvoj uzotaj en la konferenco, ne en la Propono pri Proceduraj Reguloj, kie en ĉiuj normalaj internaciaj konferencoj ĝi devus troviĝi, sed sub la rubriko Ĝeneralaj Informoj. Pri la informo, ke la konferencaj laborlingvoj "estos la angla kaj la franca", la konferencanoj, ŝajne, ne havis pli da decidrajto, ol pri la situo de la poŝtoŝefo aŭ pri la kurzo de la franko — informoj aperantaj sub la sama rubriko.

La amendo-propono de UEA

La 6-an de septembro UEA skribis al la prezidantino de la konferenco, proponante amendon de la Proceduraj Reguloj. Laŭ la amendo de UEA, la laborlingvoj estus tie difinitaj: la angla, franca, hispana kaj rusa. Krome, la amendo difinis, ke "ĉiu delegito aŭ observanto rajtas paroli en kiu ajn alia lingvo, sed li devas mem prizorgi interpreton de lia parolado en unu el la laboraj lingvoj". La propono atentigis, ke tiu amendo neniel ŝanĝas la principan starpunkton de UEA, nome ke la tuta sistemo de oficialaj kaj laboraj lingvoj signifas diskriminacion.

Antaŭ la unua laborkunsido de la konferenco, kiu okazis la 16-an de septembro, faris inaŭgurajn paroladojn nombro da eminentuloj: René Maheu, U Thant, Kenneth Kaunda, René Cassin. La parolado de U Thant aparte menciis dufoje la egalecon de rajtoj por ĉiuj sendepende de la lingvo.

Nur post la inaŭgura sesio, dum la unua laborkunsido, la konferenco havis okazon diskuti la proponitan Proceduran Regularon. Malgraŭ la fakto, ke la amendo de UEA atingis la prezidantinon jam plurajn tagojn antaŭ la konferenco, ĝi estis nek tradukita (el la angla

en la francan), nek multobligita, nek distribuita al la konferencanoj. Sekve ili povis konatiĝi kun ĝi nur per la nekompleta kaj improvizita voĉa traduko de la prezidantino, kiu, ignorante antaŭan skriban peton de UEA, ke ĝia delegacio ricevu unue la parolon, mem prezentis la amendoproponon kun nombro da propraj aldonoj kaj rimarkoj, kiuj evidente celis malsukcesigi la proponon. La proponon, ke ĉiu rajtu paroli en sia propra lingvo, se lia delegacio prizorgas la interpretadon, ŝi eĉ ne menciis.

Tro malfrue UEA ricevis la parolon. En etoso de neseriozeco (unu delegito eĉ asertis, ke oni malŝparas tempon per "stultaĵoj pri lingvo"), kaj nur post insistado de UEA, ke tamen okazu voĉdono, oni fine voĉdonis pri la amendo. La propono falis. La dua parto — pri la rajto paroli en sia propra lingvo — malsukcesis per 19 favoraj voĉoj kontraŭ 37, kun 2 sindetenoj. (Kompreneble, kiel kutime, multaj ne ĉeestis.) Plej konsternite, la propono estis rifuzita sen iu ajn kontraŭargumento.

La skriba protesto de UEA

Tuj la postan tagon la delegacio de UEA liveris al la Gvida Komitato fortan skriban proteston kontraŭ la misprezento de la amendo kaj la miskonduko de la debato. Ĝi emfazis, ke la rifuzo permesi al delegitoj uzon de la propra lingvo sub la ditaj kondiĉoj (kiuj tute senŝarĝigis la konferencon el financa vidpunkto) estas *absolute nedefendebla*.

Malobservo de Homa Rajto

La principo de lingva egaleco — tiel atentigis la protesta letero — estas rekonita en la Ĉarto de UN, en la Universala Deklaracio, en la du Paktoj kaj en aro da aliaj instrumentoj de Homaj Rajtoj. La rifuzo signifas krudan malobservon de unu el la bazaj rajtoj difinitaj en la Universala Deklaracio, kaj tion UEA ne povas akcepti, des pli, en la kadro de konferenco pri Homaj Rajtoj.

La letero de UEA postulis: aŭ ke la Gvida Komitato rekonu la validecon de la principo, aŭ restarigon de la demando en la konferenco. Se neniu el tiuj eblecoj estos akceptita, UEA proteste forlasos la konferencon.

Pedagogia konferenco pri Homaj Rajtoj

Sub aŭspicio de UEA

Sub la alta protekto de la ministro por kulturaj aferoj de la germana federacia lando Niedersachsen okazis pedagogia Esperanto-konferenco pri "Fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj", de 20 ĝis 29 septembro en la Internacia Domo Sonnenberg, Germanujo, kiel parto de la speciala programo, kiun kontribuas UEA al la Jaro de Homaj Rajtoj. La konferencon organizis la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj. Partoprenis 80 personoj el 18 landoj.

La inaŭgura kunsido

La inaŭguran paroladon pri "La Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj kaj ĝia enkorpiĝo en la juro de nacioj" faris prof. d-ro Ivo Lapenna. La inaŭguron ĉeestis reprezentanto de la honora protektanto. Diversaj germanaj instancoj sendis salutleterojn, inter ili la rektoroj de du germanaj universitatoj.

Prof. d-ro Lapenna traktis en la dua prelego diversajn konvenciojn, la du paktojn kaj la aldonan protokolon pri Homaj Rajtoj. "La lingva diskriminacio kaj la Internacia Lingvo kiel efika rimedo de interpopola rilatado" estis la temo de la tria prelego. D-ro Victor Sadler (Rotterdam) analizis la lingvajn barojn al literaturaj interŝanĝoj inter la popoloj kaj pledis por la establo de kultura demokratio. D-ro Paul Neergaard (Kopenhago), direktoro de Ŝtata Instituto de Sempatologio por la Evoluado, prezentis en du prelegoj la lerneajn problemojn en la evoluantaj landoj kaj diversajn metodojn de la unuopaj ŝtatoj rilate al la evoluhelpado. Prof. Rudolf Rakuša (Jugoslavio) provoke parolis pri la Internacia Lingvo kaj la Homaj Rajtoj en la establita mondo. Prelegoj kaj diskutrodoj okupis sin pri modernaj metodoj de Esperanto-instruado, pri Esperanto-metodiko kaj la aŭtomata gramatiko, pri kiuj prelegis prof. Rakuša, docento Dimov (Bulgario) kaj prof. Gauder (Hungarujo). Pri ekonomiaj aspektoj de Homaj Rajtoj, precipe pri liberalismo kaj direktismo kaj pri ekonomia evoluo, prelegis d-ro Werner Bormann (Hamburg). Günther Becker, ĝenerala sekretario de UEA, elstarigis la rolon de UEA en internaciaj rilatoj.

Granda interesiĝo ĉe raportistoj

La konferenco, kiu havis altan nivelon kaj klare elmontris la malavantaĝojn kaj malutilajn efikojn de la reganta lingva diskriminacio en la internaciaj rilatoj, trovis grandan interesiĝon ĉe la germanaj gazetaro, radio kaj televido.

Ludwig Pickel



Parto de la delegacio de UEA (prof. Lapenna kaj d-ro Sadler) antaŭ la domo de Unesko en Parizo.

La respondo de la prezidantino estis komplete negativa. Per letero de la 18-a de septembro la delegacio de UEA anoncis, ke ĝi do ne havas alian eblecon, ol forlasi proteste la konferencon, kaj ke la Asocio rifuzos partopreni en kiu ajn estonta konferenco, kiu ne rekonos en unu formo aŭ alia la bazan principon de lingva egaleco.

La 26-an de septembro UEA dissendis al ĉiuj NRO la kompletan tekston de la korespondadoj pri tiu temo, por ilia informo.

Angla-franca hegemonio

Estas klare, ke la diversaj NRO elektis kiel delegitojn personojn, kiuj scias aŭ la francan aŭ la anglan. Tio havis du ĉefajn sekvojn: unue, ke la konsisto de la konferencanaro tute ne estis monde reprezenta, kaj due, ke la delegitoj plejparte ne sentis en la konferenco ian lingvan problemon (kvankam ili ja sentis ĝin, kiam la aŭskultiloj misfunkciis kaj kiam ili devis voĉdoni pri propono, kies teksto ankoraŭ ne estis tradukita — kun la rezulto, ke 29 personoj sindetenis, ĉar ili ne sciis, pri kio temas!). Tiu hegemonio angla-franca estis certe la ĉefa kaŭzo de la rifuzo de la amendo-propono de UEA.

Pri la decido de UEA forlasi la konferencon kaj pri la motivoj informis la gravaj ĵurnaloj "Le Figaro" kaj "Combat" kaj la gazet-agentoj AFP, Reuter kaj UPI — laŭ nia scio la solaj mencioj aperintaj pri la laboro de la konferenco.

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono (01) 904 9081.

Propono de Hindujo al Unesko pri la lingva problemo

La 15-an de oktobro 1968 komenciĝis en Parizo la 15-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko. Anticipe al la Konferenco, la Sekretariato de Unesko dissendis nombron da rezoluci-proponoj ricevataj de la Ŝtatoj-Membroj. Inter ili troviĝis rezolucio proponita de Hindujo, distribuita sub la numero 15 C/DR/35. Hindujo proponas amendon al la ĉapitro 3 (Sociaj sciencoj, Homaj sciencoj kaj Kulturo) de la provizora Programo kaj Buĝeto de Unesko por la venonta dujara periodo 1969-1970.

La ŝarĝo de lingvo-lernado

Jen la preciza teksto de la rezoluci-propono de Hindujo:

La Ĝenerala Konferenco,

KONSIDERANTE la bezonon de la popoloj, precipe la junularo, interkomuniki pli facile en internaciaj kadroj;

KONSIDERANTE ankaŭ la kreskantan ŝarĝon, kiun signifas por la junularo la lernado de pluraj lingvoj kaj skribsistemoj;

REKOMENDAS, ke la Ĝenerala Direktoro organizu kaj kunordigu esplorojn kaj studojn sur la kampo de lingvistiko, kiuj koncernu praktikajn reformojn por trovi komunan skribsistemon por interligi la popolojn.

Kiel oni vidas, la unuaj du alineoj de la propono emfazas la problemojn tiel de la diverseco de lingvoj kiel ankaŭ de la diverseco de skribsistemoj. La tria (rekomenda) alineo, aliflanke, temas nur pri skribsistemoj. Kiel konate, en Hindujo ekzistas tre granda nombro da lingvoj kaj ankaŭ tre granda nombro da skribsistemoj, tiel ke, praktike, ĉiu el la pli vaste parolataj hindaj lingvoj havas propran unikan alfabeton. Tio kaŭzas, ke por hindoj la problemoj de lingva diverseco kaj de skriba diverseco estas tre proksime interligitaj.

Respondo de la Ĝenerala Direktoro

Tion tre bone komprenis la Ĝenerala Direktoro de Unesko, kiel montras lia "Noto" aldona al la hinda rezoluci-propono. Jen la teksto de tiu "Noto":

La problemoj aludita en la rezoluci-propono prezentas du tre malsamajn aspektojn. Se oni celas anstataŭigi per novaj sistemoj la lingvojn aŭ skribsistemojn, kiuj formas esencan parton de la kultura heredaĵo de la diversaj nacioj, aŭ aldoni al ili aliajn, tiam kia ajn formo de internacia agado ŝajnas tute ne diskutebla. Respekto por la diverseco kaj originaleco de la kulturoj estas nerompebla principo alvokita je multaj okazoj en la pasinteco, kiam oni petis la Organizaĵon antaŭenigi la disvastigon de artefaritaj lingvoj.

Aliflanke, progresoj en lingvistikaj studoj kaj matematikaj esploroj ebligis provi novajn metodojn de formaligo, kiuj jam montris sian valoron — ekzemple, la uzon de komputiloj en internacia dokumentado. Tio estas simple rimedoj por faciligi kaj rapidigi la komunikadon de informoj.

Studo pri tiuj metodoj kaj pri la novaj skribsistemoj, kiujn proponis diversaj personoj, povus okazi nur en la agosfero de fakaj organizaĵoj kiel ekzemple la Konstanta Internacia Komitato de Lingvistoj, al kiu oni eventuale povus turni sin tiucele.

Tiu ĉi respondo de la Ĝenerala Direktoro enhavas du ĉefajn misprezentojn, kiujn analizas la ĉefartikolo de tiu ĉi eldono de "Esperanto". UEA, kiun reprezentas observanto ĉe la Ĝenerala Konferenco, jam skribis al la Ĝenerala Direktoro por esprimi sian subtenon por la hinda propono kaj por korekti la misprezentojn faritajn.

Materialoj de CED en nederlanda ekspozicio

Laŭ peto de la organizantoj CED disponigis kvanton da libroj el la materialoj de la Universala Ekspozicio por stando pri la Internacia Lingvo en granda internacia ekspozicio en Hengelo, Nederlando de la 31-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro. Pli ol 50 000 personoj vizitis la ekspozicion, kaj la aranĝintoj disdonis 12 000 flugfoliojn pri Esperanto. La materialoj de la Universala Ekspozicio, kies ĉefa parto konsistas el preskaŭ 3 000 libroj kaj broŝuroj, restas disponeblaj al ĉiu organizaĵo, kiu prenas sur sin la ambaŭdirektajn transporto-kostojn.

Forpasis Honora Membro

NEKROLOGO

AŬGUSTENO PLOUSSU (1875-1968)

Mortis en Grenoble, Francujo, la 25-an de septembro 1968, honora membro de UEA s-ro A. Ploussu, tre malnova membro, siatempe delegito kaj laste fakdelegito. Li lernis la Internacian Lingvon en 1900.



Prezidanto Jonas respondas al rimarko de Dušan Jeneckov. Maldekstre: la aliaj delegacianoj, prof. Boža Popović kaj s-ino Jelena Šaponjić.

AKCEPTO DE PREZIDANTO JONAS

Delegitaro jugoslavia

La 30-an de septembro, en la Malnova Kortego sur Dedinje en Beograd, la Federacia Prezidanto de la Respubliko Aŭstrujo s-ro Franz Jonas, kiu tiutempe troviĝis en oficiala ŝtata vizito al Jugoslavio, akceptis en aparta aŭdienco delegitaron de Jugoslavia Esperanto-Ligo. La delegitaro konsistis el Dušan Jeneckov, vicprezidanto de JEL, Jelena Šaponjić, ĝenerala sekretario de JEL, kaj prof. d-ro Boža Popović, direktoro de Jugoslavia Esperanto-Instituto.

La membroj de la delegitaro diras, ke tuj de la komenco, je insisto de Prezidanto Jonas, oni evitis la kutimajn ceremoniaĵojn kaj la preskaŭ duonhora konversacio fluis spontane kaj senĝene kvazaŭ ne temus pri aŭdienco ĉe ŝtatestro. Montriĝis, ke s-ro Jonas, kiu, kiel konate, jam dum pluraj jardekoj regas la Internacian Lingvon kaj iam eĉ tre aktivis en la Movado, ankaŭ nun plene posedas la lingvon kaj estas bone informita pri diversaj okazaĵoj en la Movado.

Dum la konversacio Prezidanto Jonas diris, ke li ne estas kontenta pri la nuna stato de la Movado. Li aparte emfazis, ke oni sentas, "ke esperantistoj klopodas" antaŭenigi la aferon, "sed la oficialuloj ne montras intereson". Parolante pri tiuj lastaj, li aldonis, ke, lerninte iun

lingvon, la "oficialuloj" konsideras tion sufiĉa, sed "estu eĉ tiel, ili devus konscii, ke tio ne sufiĉas al la popolo".

Prezidanto Jonas montris apartan intereson pri la Esperanto-Movado en Jugoslavio kaj pri kunlaboro de jugoslaviaj kaj aŭstraj esperantistoj. Kaj denove evidentiĝis, ke li jam aŭdis pri diversaj aferoj, kiel ekz. la Somerumejo en Primošten kaj eĉ pri la venontjara okazigo de SAT-Kongreso en Novi Sad. Foliumante lukse bnditajn jarkolektojn de "La Suda Stelo", kiujn transdonis al li la delegitaro, s-ro Jonas, memorinte sian grafikistan profesion, demandis, ĉu la kompostistoj, kiuj prizorgas la revuon, scias la Internacian Lingvon. Al nea respondo li diris: "Bonvolu saluti la kompostistojn. Diru, ke mi salutas ilin kiel iama kolego, kiu opinias, ke ili povus esti iom pli modernaj kaj lerni Esperanton".

La gastiganto simpatias

La membroj de la delegitaro informis Prezidanton Jonas pri la simpatioj, kiujn lia nuna gastiganto Prezidanto Tito jam plurfoje esprimis pri Esperanto, kiun li mem foje lernis. Ni havas plurajn kialojn kredi, ke la Aŭstra Prezidanto bone notis tiujn informojn kaj ke li uzos ilin eble jam dum la daŭro de ĉi tiu vizito kaj kontaktoj kun Prezidanto Tito.

S. Milojević



*Spirito: gaju pri la kuriozo,
se vi emas...*

*Koro: doloru pro la perdo,
se vi bedaŭras...*

*Menso, serĉu pri la paralelo,
se vi scivolos...*

*Sed — intencon de la aŭtoro
ne demandu...!*

Li kuŝis en la ĉerko silente.

La entombiga ceremonio ĵus komenciĝis.

Granda homamaso ĉirkaŭstaris la drapiraĵe kaj flore ornamitan katafalkon. Enuigaj oratoradoj, vanta fanfaronado pri propra eminenteco, sub preteksto de laŭdparolo pri meritoj de la Mortinto.

Li kuŝis silente kaj aŭskultis.

Elverŝo de larmoj, ĉiam pretaj fluegi en tiaj okazoj sur la solene vestitajn filistrajn brustojn.

Li kuŝis silente kaj Lia brusto jam ne moviĝis. Liaj pulmoj jam ne spiris, sed Li ankoraŭ pensadis per la eterne pulsanta vivritmo de la ekzisto.

Gravaj mienoj, plenaj de ŝajnigata emocio pro forpaso de la Granda Poeto kaj de sincera konscio pri la grandiozece de la propra funkcio en la okazanta solena celebrado.

Lia mieno ne estis grava. Li nur ridetis modeste kaj iom petole, kiel en la tuta vivo. Li kuŝis silente kaj ridetis. Li ridetis pri la flamo de la torĉoj, pri la aplombvoĉaj oratoroj, pri la amaso da florkronoj, pri la pezpaŝe funkciantaj oficialaj reprezentantoj de altaj instancoj. Li ridetis pri ĉio.

Li ridetis kaj cerbumadis. Li ridetis pri la tuta solena farso. Li cerbumadis pri novaj rimoj, novaj kantoj.

La Mortinto cerbumadis kaj ridetis. Lia petola rideto primokis la vanecon de la postmorta apoteozo kaj Lia soifa gorĝo vane glutadis el la malplena buŝo gutetojn da rubene brila, dolĉarome palatotikla ruĝa vino, tre dezirita sed ne trinkita antaŭ la morto.

La oratoro parolis pri la eterna honoro, per kiu la posteularo Lin omaĝos, kaj Li pensis pri la lasta soleca vespermanĝo en la hospitalo, post kiu Li preskaŭ malsate endormiĝis, por neniam plu revekiĝi...

...Jes ja! Ankaŭ tio estis ĉarma petolaĵo! La homoj scias ja tiel, ke Li ankoraŭfoje vekigis en tiu lasta tago kaj nur dum la sekva vesperkrepusko Li forpasis. Sed tio ja estis nur ŝerco kaj mistifiko, kiujn Li faris! En tiu tago Li jam ne vivis. La homoj parolis kun Li, faris al Li demandojn, postulis de Li respondojn, sed Li sciis, ke Li jam ne vivas. Enpense Li ridis, ke ĉiu Lin kredas vivanta, kvankam Li havas jam nenion komunan kun la interesoj de la tuta vante brua homa svarmado. Li estis jam mortinta tiam...

...Kiam do la homo envere mortas?... Ĉu

nur tiam, kiam la korpo ĉesas sin movi kaj la koro batadi, la pulmoj spiri?... Ĉu la morto envere ne trafas jam tiam, kiam la homo ekscias, ke li jam ne plu povos krei ion, kio lin postvivos?... Post tia rekono la korpo eble funkcios ankoraŭ unu tagon, unu jaron, multajn jardekojn, sed tia vivo jam ne estas plu vivo...

...Li sciis jam tiam, ke Lia korpo funkcios ne pli ol unu tagon, sed Li sciis ankaŭ tion, ke tiu lasta tago estos malplene vana. Li devos akcepti vizitantojn, fari komplimentajn vortludojn, inde al sia eminenteco. Li agadis, interparolis vigle, sed Lia vivo estis jam finita. Li jam ne havis tempon por surpaperigi la lastajn ĉarme tintajn versojn, kiuj dum akcepto de la vizitantoj naskiĝis en Liaj cerbo kaj koro. Tiuj versoj jam eterne migros kun Li en la Nenio, kaj la homoj neniam legos nek deklamos ilin.

Li kuŝis en la ĉerko silente kaj pensadis.

...Jes, en tiu tago Li jam estis mortinta. Sed nun, mortinte kuŝanta sola en la ĉerko, Li denove sentas la bolon kaj brulon de la vivo, ĉar denove Li eksentis la tuŝon de sia Muzo...

La Mortinto kuŝis en la ĉerko silente kaj senmove. Li cerbumadis pri novaj senmortaj poemoj, pri homaj sentoj, pri eterna sonĝo

de la homa kreado: pri la Belo...

La unua parto de la solena ceremonio jam finiĝis. La oratorintoj kontente remaciis la proprajn spritaĵojn, la funebranta publiko spektaklosate digestis la brilan roladon de siaj eminentuloj, la profesiistoj de la morto faris indiferente sian devon. La ĉerko falis barelbrue sur la plankon de la nigra transportaŭtomobilo. Ankoraŭ du falkrakoj: la tombfosistoj ĵetis la lignan nomtabulon — lastan Lian havaĵon — kaj la ŝovelilon apud la ĉerkon.


Kaj la aŭtomobilo malrapide ekiris. Ĝin sekvis la funebrantaro solenmarŝe.

Li kuŝis en la ĉerko silente kaj cerbumadis. Li cerbumadis pri tio: kiom el la omaĝe funebranta homamaso fakte legis Liajn poemojn?... Kiom el ili envere konas Liajn pensojn, kiom el ili sincere estimas Liajn sentojn... pri la mondo, pri la vivo kaj morto, pri la homoj — pri ili mem?...

La homa amaso — grege direktata senvola maso — marŝis solenpaŝe, solene vestite post la ĉerktransporta aŭtomobilo.

Li kuŝis en la ĉerko silente kaj ridetis. Li ridetis petole kaj iom moke.

...Ho se ili sciis, kion Li nun pensas pri ili!... Ĉu ili daŭrigus la solenan omaĝmarŝon por ĉeesti la enterigon; aŭ ofendite ili diskutus kaj sakre blasfemus kontraŭ la maljuna vagabondo, kiu eĉ en la ĉerko primokas la filis-



©
Andreo Szabó

MORTO DE LA POETO

(... Tiel, kiel ĝi ne okazis...)

Kroniko mensoga pri malvera okazaĵo

trojn?...

La Mortinto laŭte ekridis. La lignaj tabuloj de la ĉerko kaverne resonis la krake raŭkan ridotrilon.

La solenataro ne aŭdis tion. Ili iris hipokrite kaj surde. Ili iris kun okuloj mallevitaj kaj mienoj tradiciobee kadavroitaj. Ĉiujn iliajn movojn, ĉiujn iliajn vortojn, ĉiujn iliajn pensojn direktis kaj superregis la tradicioj.

Kaj en la ĉerko kuŝis silente la Mortinto, kiu neniam obeis tradiciojn, kiu iris ĉiam sian propran vojon.

Li silente kuŝis tie kaj ridetis moke pri la funebra farso.

Li ridetis kaj en penso poeme priverkis la propran entombigon. Li ĝin priverkis, per lasta, postmorta ekflamo de la poeta talento. Sed tiun poemon jam neniu legos nek aŭdos. La rimoj perdiĝis en la ĉerka kavo, la pensoj forputros kun la putranta cerbo, la sentoj diserige neniigos kun la rigida, neniiganta koro.

La gasellasaj tuboj de la nigra aŭtomobilo diskrete teftefis, la benzina fumo profane miksiĝis kun la pike funebra odoro de la alkoholaĵ torĉoj.

La procesio alvenis ĉe la lokon de la entombigo. La fosaĵo estis jam pretigita, nur la

ĉerko kun la kadavro mankis el ĝi. La terodora kavo avidfaŭke, postule atendis sian kaptajon. La funebrantaro svarme kolektiĝis ĉirkaŭ la freŝa tervundo, la enterigistoj portis la ĉerkon el la aŭtomobilo al la tomba kavo.

Li kuŝis en la ĉerko silente kaj pensadis. Li pensis pri tio: ĉu ankoraŭ longe daŭros la festa komedio?... Li volis jam resti sola; sola kun siaj pensoj kaj rememoroj — planoj kaj esperoj... Li volis resti sola, kiam Li renkontos finfine la iam timatan sed nun jam, depost kelkaj jaroj de la longa malsanado, rezigne atendatan Nekonataĵon. Li volis resti sola, kiam Li ekvidos la vivlongan sonĝon de poeto, pri Belo kaj Harmonio. Li volis resti sola, kiam Li adiaŭos, per versoj lastfoje pri-kantos ĉion postlasitan, ĉion atendatan.

Sed la solenanta homamaso ankoraŭ funebre tumultis, la ĉetombaj oratoradoj, laŭmode prezentataj adiaŭaj scenoj ankoraŭ daŭris, la tombfosistoj brue funkciadis, la blovorkestro orelagace gurdis.

Li estis jam laca. La rideto iom paliĝis sur Liaj lipoj. La petolemo ŝanĝiĝis en morozan malkontenton. Jam tedis Lin la vanta ceremonio, la vaneco de la tuta kavalkado.

'Je la nomo de viaj disĉiploj... Je la nomo de la... Je la nomo de la...'

Kaj la adiaŭaj vortoj bombaste falis en la kapon, sur la kovrotabulon de la ĵus enkondukita ĉerko.

Unua premio,

Branĉo
Originala prozo,

Belartaj
Konkursoj 1968

Lace Li volis sin turni en la ĉerko. Sed la korpo jam ne obeis. Li devos jam resti en tia situacio ĝis la plena forputriĝo de la karno kaj ostoj. En situacio solene digna, kun manoj majeste krucmetitaj sur la brusto, kun kapo aŭtoritatece iom levita, kiel la zorgemaj kadavroordigistoj aranĝis por la senfina eterno Lian jam rigide obean korpon. En situacio tradicia, kiun ne Li mem elektis por propra uzo. La unuan fojon okazis, ke Li akceptis tradicion, ke Li ŝanĝis sian bone konatan, senceremonie naturan sintenon en pozon grandioze gravecan de eminentulo.

Li estis jam laca.

La ceremonio proksimiĝis al la fino. Lastaj vortfloroj falis en la tombon, lastaj akordoj de la muziko muĝis en Liaj lacaj timpanoj. La nigra aŭtomobilo jam diskrete forruliĝis, por alia kliento. La tempo ja urĝas, ankoraŭ multe da veturontoj atendas.

Restis jam nur la kovro de la ĉerko per tero, surmeto de la ligna nomtabulo, kuŝanta apude, kaj ordigo de la florkronoj, amasigitaj dum la adiaŭaj paroladoj apud la tombokavo.

La spektaklo finiĝis, do jam multaj foriris, ĉar malagrabra vento blovis.

La tombfosistoj ĵetis per ŝovelilo la unuan bulon da tero sur la ĉerkon.

Kaj tiam maljuna viro alpaŝis la randon de la tombokavo, malrapide, kun diskreta movo. Lia staturato altis rigide super la profundo. La vizaĝo palis kviete, kun okuloj sekaj, direktitaj al la ĉerkosupro. La grizaj haroj flirts brile en la forta ventoblovo. Kvazaŭ la Mortinto mem estus leviĝinta el la tomba kavo kaj rigardus la propran enterigon.

Kun kava resonado la unuaj terbuloj daŭris tamburi sur la kovroplato de la ĉerko.

La Viro staris kun rekta dorso; kaj sen larmoj en la sortkomprene nebulvualaj grizaj okuloj.

La tombfosistoj faris sian laboron sen ĉeso.

La Viro levis la dekstran manon, kaj unusola floro falis el ĝi flirte sur la nigre sin kaŝantan ĉerkosupron.

La malpeze karesan faltuŝon de la floreto tambure superbruis la indiferente falfrapiĝanta teramaso. La floreto vee svenis sub la premo de la akre frostaj terbuloj.

La Viro adiaŭsalute sin klinis iom al la tombokavo, sin turnis kaj foriris, kvazaŭ kiel aktoro foriras post kulmina sceno de la dramo de sur la scenejo; aŭ... kvazaŭ samsortano, kiu nur ĝisis amikon por... baldaŭa renkonto...

La terbuloj kanone ektondris sur la ĉerka supro, la vento tempeste ekfuriozis, sed la Mortinto en la tumulte tondranta bruego eksentis la malpezan tuŝon de la lasta adiaŭo, falinta el mano de la malnova amiko; kaj Li ekflustris per senmovaj lipoj, per senspira spiro, per senvoĉa voĉo:

— Ĝis...

La Viro foriris; kaj la Mortinto restis sola sub la peze prema teramaso, malproksime de la indiferente funebranta homa maso.

Kaj en tiu momento Li mortis definitive.

VERKO PLENA DE SUBTILECO

Recenzas F. S. Wechsler (Rio de Janeiro):

El la vivo de Syunkin, de Tanizaki zyun'itiro. Tr. Miyamoto masao kaj Isiguro teruhiko. Oosaka: Pirato, 1968. 145 p. Ilus. 22 cm. (Serio Oriento-Okcidento n-ro 9).

Tiu ĉi libro konsistas el du teatraĵoj kaj du noveloj. Estas absolute vane serĉi en ĝi streĉan rakonton. Por kompreni la pozicion de l' aŭtoro, ni devas meti nin en la animon de orientano. La pozicio estas esence kontemplema: ne tiom la sekvo de l' eventoj gravas, kiom la efiko sur la sentoj kaj sensoj. Orientanoj ĝenerale havas la kvin sensadojn pli rafinitaj, kaj sekve ĉia detaleta grave rolas; kolornuanco, voĉtono, muzikakordo, ĉio kontribuas por konstrui la


ĝeneralan bildon.

Tiuj kvar pecoj de Tanizaki zyun'itiro estas plenaj de subtilaĵoj. La enhavo estas vualita jen per mistikismo, jen per apenaŭ senteblo ironio, jen per delikata erotikeco, kaj la tutan verkon trateksas nedifinebla melankolio. Tamen elstaras la deziro komponi agrablan, multekoloran bildon. Ni povas senti maskitan influon de l' okcidento, kaj ĝi kelkafoje kontrastas la japanartan tradicion.

Profundeco kaj emocikapablo

La plej bona peco estas sendube "El la Vivo de Syunkin", pro siaj profundeco kaj emocia kapablo. "Knaboj" portretas infanmondon plenan de pasioj, kaj "Mumyô kaj Aizen" kondu-

Nova verko popularscienca pledas por Esperanto



Mario Pei

Recenzas John Wells (Londono):

What's in a Word? Language — Yesterday, Today, and Tomorrow, de Mario Pei. New York: Hawthorn Books, 1968.

Popularscienca libro pri lingvoj — kun akcento pli populara, ol scienca. Ĝi konsistas plejparte el facile legeblaj gazetartikoloj, verkitaj inter 1944 ('situacia' lingvo-instruado) kaj 1963 (Marshall McLuhan). Ĝi havas kvar partojn: pri etimologio, pri lingvaj kuriozaĵoj, pri lingvo, libroj kaj pedagogio, kaj pri la Internacia Lingvo (tiele!). Ĉi lasta parto, plej interesa por niaj legantoj, prezentas per kvin ĉapitroj pledon por solvo de la lingva problemo kaj diskutas la diversajn manierojn por ĝin atingi. "Tute sen fanatikeco; tute sen insisto, ke oni devas elekti Esperanton aŭ nenion; ne rifuzante la eblecon de alia elekto kaj mian propran cedan akcepton de tiu elekto; plene komprenante, ke malgraŭ multjara studado de la problemo mia opinio estas nur persona opinio, kiun mi tute ne deziras perforte trudi; mi devas tamen konkludi, ke Esperanto ŝajnas al mi la plej logika, kvankam tute ne la sola ebla, kandidato por la ofico de internacia idioma."

Mendu ĉe UEA: \$ 5,95, sendokostoj 10 %.

Elstara angla lernolibro

Recenzas Felix Woolf (Cape Town):

Secondary School Esperanto; Book I, de R. H. M. Markarian kaj J. H. Sullivan. London: University Tutorial Press, 1968. viii, 143 p. Ilus. 22 cm.

De la jam ekzistantaj gramatik- kaj lernolibroj Esperanto-anglaj, nombro da trajtoj distingas la nunan verkon. Ĝi estas verkita por lerneja aŭ grupa instruado, kaj la teksto jam de la komenco, tuj post la alfabeto, senprokraste plonĝas en la lingvon, donante ĝeneralajn, diversspecajn esprimojn el la ĉiutaga vivo, kun minimuma uzo de gramatikaj terminoj. Tiel, nekonscie, oni konatiĝas kun la lingvo en senŝarĝa maniero. Multnombraj, amuzaj desegnaĵoj ludas gravan rolon, ĉar la instrumetodo estas grandparte vida, kaj tiucele ili komprenigas senĝene ne nur gramatikaĵojn sed ankaŭ objektojn el la vivo de ordinara homo.

La unua el tri partoj

La kajero estas la unua el tri-parta verko. Tial ĝi pritraktas nur 17 afiksojn kaj 24 korelativojn, kaj restas pritraktotaj ankaŭ 7 prepozicioj kaj nombro da gramatikeroj, ekzemple la kunmetitaj verboformoj.

Prave oni malpli emfazas la teknikajn aspektojn de la gramatiko, ol la vort- kaj frazformadon. Vortlistoj kaj esprimoj donitaj post ĉiu el la 20 lecionoj, lerte gradigitaj, kuraĝigas la lernanton praktiki sian nov-akiritan scion en tiu direkto.

La aranĝo, tipografio kaj papero estas bonegaj, kaj mi renkontis neniun preseraron. Entute: elstare elpensita verko, kun evidente prospera estonteco.

Mendu ĉe UEA: 4,20 gld., sendokostoj 10 %.



Kyô matiko ludis la rolon de la blindulino Syunkin en filmo eldonita en 1954. (Ilustraĵo el la libro "El la vivo de Syunkin")

KOMUNIKO DE SAT pri Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

Dank' al sindonemo de preskaŭ 2 000 esperantistoj, kiuj promesis pagi anticipe, ni povis entrepreni la eldonon de tiu ĉi proks. 1600-paĝa volumo. La presisto jam tenas la manuskripton kaj komencis la kompostadon.

Ni ne dubas, ke inter la praktikantaj esperantistoj multaj aliaj volos posedi tiun verkon, kiu markas gravan progreson por la movado. Ĝis la **31-a de decembro 1968** vi ĝuos la favoran prezon rezervatan al la unuaj mendantoj: 19 dol. aŭ ekvivalento por unu ekzemplero.

Se vi loĝas en Britujo, Aŭstralio, Nov-Zelando, Japanujo, Kanado, Portugalujo, vi pagos 8 britajn pundojn al: Joel Sulsky, 26 Cheapside, LUTON, Beds., Britujo, poŝtkonto N. 391-4054 (aŭ per bankĉeko enkasigebla en Britujo).

Se vi loĝas en Usono, 19 usonajn dolarojn al Mark Starr, 3940 47th Street, LONG ISLAND CITY, N.Y. 11104.

Se vi loĝas en Francujo, 95 fr. fr. al la speciala poŝta konto de SAT n-ro 9535.36 Paris.

Se vi loĝas en iu ajn alia lando, vi sendu 84 frankojn svisajn al la poŝtkonto de SAT n-ro 80-20049 en Zürich, Svisujo.

LASTE APERIS...

La japana religia sekto Tensho Kotai Jingu Kyo eldonis jam duan broŝuron, 72-paĝan, "Ogamisama diras". Pli modestan, ilustritan broŝuron produktis alia japana sekto: "Enkonduko al Mondo-mesianismo". Siaflanke, Pekino dissendis pliajn 4 tradukojn el malnovaj verkoj de Maŭ zedong, po 20-50 paĝajn.

kas nin al mistikismo. "Okuni kaj Gohei" ŝajnas al mi la malplej bona, eble tial, ke ĝi emas trosimpligi kompleksan am-aferon.

La tradukoj bedaŭrinde ne ĉiam sukcesas respeguli la rafinitecon de l' originalo. Ni ofte rimarkas malhomogenon: kelke da partoj estas trafaj, dum aliaj lamas. Tre ĝenas kelkloke la trouzado de l' pronomo "ŝi", de l' verbo "esti" kaj de tabelvortoj (tiu, tia k.c.).

Tre bela kovrilo, bonkvalita papero, mezbona kompostado (pluro da prezeraroj, precipe en la glosaro).

Mendu ĉe UEA: bindita 14,— gld. / 56 st.; broŝ. 11,— gld. / 44 st.; sendokostoj 10 %.

En ofseta preso aperis en Prago 49-paĝa manlibro pri la Esperanto-movado, "Co nevíte o esperantu", el la plumo de O. Kníchal. Pli lokan historion rakontas "Naskiĝo de Esperanto-domo Kastelo Grésillon", 15-paĝa, grandformata, ilustrita broŝuro el Francujo. (2,60 gld.)

Reaktiviĝis post malsano Taekeng Gim. De li ĵus atingis nin "Vortaro de Esperanto: Esperanto-korea", preskaŭ 200-paĝa bindita volumo, kaj la oka eldono de "Lernolibro de Internacia Lingvo Esperanto" (79 p.). Alia reel-dono estas tiu de "Ellernu! Progresita kurso de Esperanto" de Ferenc Szilágyi. Ĝia dua, ilustrita eldono aperis ĉe Kultura Kooperativo en Rio.


Tradukoj el Moskvo kaj Bagdad

Ekzotikaĵo, kiel jam montras la ortografio, estas la 85-paĝa multobligita volumo "Kwasaroj... ĉu estiĝantaj sunsistemoj?" de Manuel Halvelik. (Prezo: 15 st.). Vojaĝante el la kampo de fiziko al tiu de belliteraturo, ni renkontas ĉi-monate du notindajn volumetojn: "Liriko" de Federico García Lorca, tradukoj el la hispana de K. Gusev eldonitaj en Moskvo laŭ la kutima ofseta sistemo (1,80 gld.), kaj "Arabaj maksimumoj de la sepa jarcento kaj aliaj diversaj maksimumoj", presita libro 77-paĝa tradukita de Husen Al-Amili kaj eldonita en Bagdad sub la ŝildo de "Araba Esperanto-Asocio". La "aliaj diversaj maksimumoj" estas grandparte sentencoj de George Bernard Shaw.

Furoron atingis en Japanujo en la lastaj jaroj la japanlingva rakonto de Kiotaro Deguti pri mondvojaĝo per Esperanto. Nun la sama verko aperis angle sub la tilolo "My Travels in Esperanto-Land". La ilustritan volumon eldonis Oomoto je prezo de \$ 2,—.

Mendojn de novaj eldonaĵoj oni bv. adresi al la Libroservo de UEA. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki prezon en guldenoj aŭ steloj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

LOKE - FAKE - PERSONE



Elokventas estraranoj ĉe la jarkunveno de Kolombia Esperanto-Societo en Kartageno — sed unu membro restas nekonvinkita.

LOKE

Brazilo

- Pli ol mil personojn allogis ekspozicio en Atibaia, Brazilo. Rezulte: ekfunkcios elementaj kursoj kaj Esperanto-biblioteko en la urba muzeo.

Britujo

- En aŭgusto okazis jam dekafoje intensaj kursoj por instruistoj en Stoke-on-Trent. Partoprenis 40 personoj, i.a. el Usono kaj Kanado; gvidis 4 kursestroj, inter kiuj Michel Duc-Goninaz el Francujo.

Ĉeĥoslovakujo

- La 14-an kaj 15-an de septembro — malgraŭ la lastatempaj okazaĵoj en la lando — okazis sukcesa renkontiĝo kun 154 partoprenantoj, en Dudince, suda Slovakujo.

Hindujo

- La hinda registaro lastatempe malpermesis la uzon de la portugala lingvo en preskaŭ ĉiuj oficialaj instancoj de Goa, la iama portugala teritorio ĉe la okcidenta bordo.

Nederlando

- La instruado de Esperanto en la Universitato de Amsterdam, ĉesinta je la morto de mag. S. Pragano, rekomenciĝas ĉi-jare sub la gvido de f-ino A. J. Middelkoop.

Portugalujo

- Esperanto-fakon ĵus starigis la Societo de Portugala Lingvo (Lisbono, Rua de S. José 41, 2^o).

Sirio

- Siriaj studentoj deziras lerni Esperanton pere de la angla aŭ franca lingvo. Se vi estas angla- aŭ franc-lingvano kaj pretas donaci lernolibron kaj gvidi la lernadon per persona korespondo kun siria studento, skribu al: Mo-

hamed Schaher Schwekani, Maza Algallo Sporting Club, Damasko, Siria Araba Resp.

Soveta Unio

- Ekde 1 julio 1968 estas oficiale aboneblaj per la Soveta Poŝto tri Esperanto-revuoj: "Paco", "Nuntempa Bulgario" kaj "Hungara Vivo". La abonkvanto, tamen, estas limigita.

Tanzanio

- La 25-an de septembro Radio Tanzania unuafoje elsendis pri Esperanto: ŝahilan intervjuon kun Paskal V. X. Sao, prezidanto de Tanzania Esperanto-Asocio. S-ro Sao ĵus revenis el studrestado en Svedujo.

Usono

- La ĉi-jara kongreso de ELNA en Covina, Kalifornio, estis la plej granda en ĝia historio (221 anoj). La kongreso oficialigis la okcidentan inform-centron en Kalifornio, kiun gvidas ges-roj Schulze. En Nov-Jorko ELNA jam havas inform-centron por la orienta parto de Usono.

FAKE

Esperantologio

- En Usono estas preparata la fondo de "Esperantic Studies Foundation" (fondaĵo por esperantologiaj studoj) por stimuli sciencajn esplorojn pri la lingvo, literaturo, historio, sociologio ktp de Esperanto. La ideon lanĉis E. James Lieberman, Jonathan Pool kaj Eleanor Higginbottom.

Komerco

- Novajn reklamilojn en Esperanto eldonis la 23-a Mediteranea Specimenfoiro en Palermo, la Foiro de Brno, Ĉeĥoslovakujo, kaj la firmo Medicor (Budapest 62, P.O.B. 150), kiu produktas elektro-medicinajn aparatojn.

Literaturo

- En la Filologia Fakultato de la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto membro de UEA



s-ro Vilmos Benczik preparas disertaĵon pri la verkaro de Sándor Szathmári.

Teatro

• Bulgara Esperanto-Teatro prezentis en la 37-a Kongreso de BEA (1606 aliĝintoj) kaj en la 20-a Kongreso de IFEF, ambaŭ en Varna, la konatan tri-aktan komedion "Akridoj" de Stefan L. Kostov, en traduko de Kiril Drajev.

Turismo

• Aperis novaj prospektoj en Esperanto de Trans World Airlines (TWA), Mainz (Germanujo — 31 p., ilustr.), Finnlando, Hokkajdo (Japanujo), Békéscsaba, Gyula, Komló Sikonda kaj Abaliget Orfü (ĉiuj Hungarujo) kaj dek diversaj pri Hispanujo. Oni petu ilin de la koncernaj turismaj oficejoj.

Unesko

• La ilustrita monata revuo "Kuriero de Unesko", ĝis nun aperanta en dek lingvoj, baldaŭ aperos ankaŭ en la hebrea.

PERSONE


Nagata

• F-ino Akiko Nagata, siatempe fakdelegito en Sapporo, Japanujo, alvenis en Rotterdam fine de aŭgusto por enoficiĝi en la Centra Oficejo de UEA. Tuj antaŭ sia forvojaĝo el Japanujo ŝi ankoraŭ organizis la sukcesan Japanan Esperanto-Kongreson en sia urbo.

Santos

• Membro-abonanto de UEA d-ro Albertino dos Santos-Matias estas nomita ambasadoro de Portugalujo en Karaĉi. Pli frue li oficis en Tajlando kaj Ekvadoro.

En "Akridoj" de St. L. Kostov rolis BET-anoj Miĥail Ĉobanov, Belka Beleva, Margarita Duparinova kaj Gerasim Mladenov. (Vidu: Teatro).



Progresas la kongrespreparoj

54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Helsinki, 26 julio - 2 aŭgusto 1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Kongresejo

La Kongresejo estos la tre moderna kongresa centro "Dipoli" en Helsinki-Otaniemi. En ĝi, krom la laboraj kunsidoj, okazos la Interkona Vespero, la Bankedo, la Oficiala Balo, la Junulara Balo, la Libervola Teatra Presentado, la Arta Varia Vespero.

Loĝado

En kunlaboro kun la Finna Turisma Oficejo, la Loĝiga Servo de la Kongreso jam provizore rezervis ĉambrojn en diverskategoriaj hoteloj. Ni aparte atentigas pri la ebleco mendi liton en Hotelo Otaniemi (turista klaso), kiu troviĝas en la Kongresa Centro mem (je maks. 5-minuta piedirado de la Kongresejo). La prezoj varias de 8,60 gld. ĝis 21,— gld. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

Ekskursoj

Estas antaŭviditaj: 3 tuttagaj ekskursoj; ĉiutagaj ekskursoj tra Helsinki; du vesperaj ekskursoj per ŝipo. Krome antaŭ la Kongreso okazos 3-taga ekskurso al Laponujo kaj samtempe 3-taga ekskurso al la orienta laga distrikto. Post la Kongreso okazos 4-taga ekskurso al Leningrad, organizita de la Finna Turisma Oficejo. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

Postkongreso

Oficiala Postkongreso okazos en Turku. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

Statistiko (ĝis 16/10/1968)

Arg. 1, Aŭstral. 4, Aŭstr. 1, Belg. 4, Braz. 2, Brit. 15, Bulg. 10, Ĉeĥ. 2, Danl. 3, Finnl. 18, Franc. 21, Germ. 8, Grek. 1, Hisp. 6, Hung. 5, Isr. 1, Ital. 6, Jap. 3, Jug. 11, Kan. 1, Nederl. 8, Norv. 3, Nov-Zel. 1, Poll. 4, Port. 2, Sov. 1, Sudano 1, Sved. 12, Svis. 4, UAR 2, Usono 10. Entute 171 el 31 landoj.

Karavano

Aviadilan karavanon oni organizas el Nederlando sub aŭspicio de la landa asocio L.E.E.N. Adreso por informpetoj: F-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-2.

G. G. Pompilio,
Konstanta Kongresa Sekretario

esperanto, novembro 1968 / 167



LA JUNA VIVO



Oficiala organo de TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO.

**Respondecas: Robert Lloancy,
LJV, rue de la Marinade,
F-66-Tresserre, Francujo.**

La Juna Vivo ne aperis en oktobro, pro ŝanĝo de la redaktoro kaj pro relative etaj malfacilaĵoj en la transpreno de la laboro. En tiu ĉi numero vi trovos du paĝojn, sur kiuj aperas raportoj pri la diversaj okazintaĵoj dum somero kaj anoncoj pri venontaj aranĝoj. Materialon: fotojn, raportojn, artikolojn kaj kritikojn ĉiam sendu al la ĉi-supra adreso.

24a INTERNACIA KONGRESO DE TEJO

La apudmara kaj ĉarma urbo, la Imperiestra Tarragona, en nordokcidenta Hispanujo, gastigis la 24an IJK. De la urbo mem restos en ĉies memoroj la centra aleo borderita per arboj (rambloj), la ĉielo ĉiam elegante blua kaj la maro malvarmeta.



Relative malalta estis la nombro de partoprenantoj. Nur 130 el 19 landoj venis. Tion kaŭzis, en la unuaj tagoj, la nericevado de vizoj por kelkaj homoj el orienteŭropaj landoj. Pro malĉeesto de la prezidanto Ivo Osibov, malfermis la kongreson la Honora Prezidanto de TEJO, Ĝenerala Sekretario de UEA: S-ro Günther Becker. La akcepto fare de la Oficialaj Instancoj estis solenoplena en la belega urbodomo; feliĉe la posta trinkado iom malrigidigis la vizaĝojn.

Tiun kongreson oni povas karakterizi per la adjektivo "inaŭguriga". Efektive, ni inaŭguris, en moderna kaj centra kvartalo de Tarragona, straton honore al d-ro Zamenhof. En Monistrol, montara vilaĝeto, ni same honorigis la kreinton de nia lingvo. Poste, en la sama vilaĝo, ni inaŭguris esperantistan restaĵon (Esperanto, julio 1968, p. 113), kiun konstruis plejparte la anoj de la nacia TEJO-sekcio. La novan domon baptis pere de vino

prof. Miguel Sancho-Izquierdo. La ŝaŭmanta vino ekfluis kaj, iom poste, ekflugis kantoj kaj ridoj el la ĝardeno de la restadejo. La reveno al Tarragona estis des pli gaja, precipe post la survoja vizito al la keloj Codorniù, kie oni produktas la ŝaŭmantan vinon laŭ la ĉampana metodo.

La antaŭa vizito al la mondfama monaĥejo de Montserrat, kun ĝia belega kaj sovaĝa ĉirkaŭaĵo, ravis ĉiujn. Same sendube, la nokta vizito de la romiaj remparoj en Tarragona, meze de lumo kaj de muziko, plezurigis ĉiujn partoprenantojn.

Malgraŭ tiuj distraj programeroj, la komitatanoj de TEJO fruktodone kunsidis ses fojojn por pridiskuti la administrajn aferojn de la Organizo. Ŝanĝoj okazis en la estraro cele al plijunigo, pri ili ni certe parolos poste. Jam de nun estas antaŭvidite, ke la venonta IJK, la 25a, okazos en Tyresö (Svedujo), survoje de Helsinki.

3a STELO-KONGRESO 13a-20a/08 AIX-EN-PROVENCE (FRANCUJO)

En la bela provenca urbo kunvenis 60 gestudentoj el 12 landoj. Krom la kutimaj programeroj pri ekskursoj kaj artaj vesperoj, okazis ankaŭ tre interesaj kunvenoj. Ni menci

unue la diversajn fakkunsidojn, interalie de la studentoj pri filozofio kaj pri filologio. Tiuj lastaj intencas daŭrigi la fakan esploron de la lingvo dum la jaro.

Ankaŭ menciindaj estas la rezultoj kaj esperoj de la seminario pri psikosociaj aspektoj de la Esperanta movado. Ses fakuloj sendis kontribuojn, kiuj instigis al diskutado. Marian Dobrzyński, organizanto de la seminario, alvokas la fakajn specialistojn, ke ili direktu sian atenton al tiu branĉo de scienca esplorado.

La studentaj eventoj okazintaj dum la lastaj monatoj en diversaj landoj ebligis tre interesajn diskutojn inter la partoprenantoj. "Homaj rajtoj kaj rajtoj de studentoj" estis la kontribuaĵo de STELO al la Jaro de Homaj Rajtoj. Ankaŭ pristudenta estis la forumo "Moderna Universitato", kiun partoprenis 30 ne-esperantistaj gestudentoj. La debato okazis en Esperanto kaj en franca lingvo kun tradukoj en

Sub eminenta patroneco

ambaŭ lingvojn.

Patronis la kongreson lokaj instancoj: Rektoro de la universitato, Prefekto, Urbestro; kaj naciaj eminentuloj: s-ro Maurice Genevoix, konstanta sekretario de la Franca Akademio, prof. Jean Rostand, biologiisto, ano de tiu Akademio, s-ro Ivanoff, profesoro en la scienca fakultato de Parizo kaj prof. Alfred Kastler, Nobel-premiito pri fiziko. La regionaj gazetoj tre favore informadis kaj aperigis ĉiutagajn artikolojn pri la disvolviĝo de la kongresaj laboroj. Aparte menciinda estas prof. Jullien, Honora Prezidanto de la LKK, kiu per sia helpemo al la junularo ebligis la belajn atingojn de la aranĝo.

INTERNACIA SKOLTA ĴAMBOREO, BRITUJO 27a jul. — 3a aug. 1968

Ĉi tiu aranĝo estis rimarkebla pro la fakto, ke oni uzis Esperanton kaj la anglan kiel oficialajn lingvojn. Tio neniam antaŭe okazis dum skoltrenkontiĝoj. Venis 1500 britoj kaj pli ol 500 el 20 aliaj landoj. S-ro Parrinder, organiza komisaro, petis ĉiujn lerni Esperanton antaŭ la ĵamboreo. Li mem tion faris. Britaj esperantistoj modele kunlaboris en la preparado de libretoj, afiŝoj, menuoj k.s. en Esperanto.

Kvankam malmultaj efektive lernis Esperanton antaŭ la ĵamboreo, post la alveno pli ol 60 skoltoj kaj estroj aliĝis al niaj klasoj por komencantoj. La utiligo de Esperanto ricevis abundan mencion ne nur de la organizanto mem, sed ankaŭ de la loka gazetaro.

La celo kaj espero de SEL estas, ke oni jam nun faru decidon, ke ĉe la Monda Skolta Ĵamboreo de Tokio en 1971 Esperanto estos la oficiala lingvo. Oni petegas la landajn Esperanto-asociojn, ke ili proponu siajn servojn al la naciaj skoltaj asocioj por instrui Esperanton al la skoltoj, tuj post kiam estos farita definitiva decido pri la lingvo(j) uzota(j) en Tokio. Raportis s-ro Raif Markarian

KONKURSO KAJ SEMINARIO DE GEJ EN KÖLN

Kiel ĉiun jaron, ankaŭ en 1968, Germana Esperanto-Junularo okazigos Internacian Seminarion. La venonta estos entute la 12a kaj la tria de la serio "Esencaj trajtoj de la hodiaŭa mondo". Ĝia temo estos: "Sociologiaj aspektoj de l'nuntempo".

GEJ alvokas al ĉiuj gejunuloj intelekto viglaj, kiuj interesiĝas kaj pri la traktota temo kaj pri nova rimedo esprimi sin pri ĝi, partopreni la Sciencon Konkurson. La temon de via traktato vi mem povas elekti, ĝi nur devas rilati al la temo de la 12a IS. Detalan regularon petu ĉe s-ro U. J. Moritz, Andreasstr. 57, 5161 MERKEN, Fed. Resp. Ger.; Valorajn premiojn ricevos la gajnintoj. Rapide skribu, manuskriptoj devas atingi la sekretarion plej malfrue la 1an/12/1968. Ni denove atentigas, ke la seminario okazos en Köln, de la 27a/12/68 ĝis la 3a/01/69.

TEJO: DU PLIAJN INFANOJN

TEJO pli kaj pli grandiĝas laŭ vastiĝo de la agadoj. Dum la lastaj monatoj, du novaj junularaj organizaĵoj oficiale petis aliĝon al TEJO. Ambaŭ estas amerikaj kaj respegulas la eĥon, kiun ricevas Esperanto en tiu kontinento. Temas pri la sekcio de Meksiko, kiu, jam antaŭ la 24a IJK en Tarragona, petis sian aliĝon; kaj pri la sekcio de Brazilo, kiu, antaŭ unu monato, sendis oficialan leteron.

Post aprobo fare de nia komitato ni esperas akcepti en nia rondo tiujn du novajn Landajn Sekciojn, por ke ĝi fariĝu pli kaj pli internacia. Tiam TEJO havos 23 LS. Kial, en la jaro de la 25a IJK, ĝi ne havos 25 LS?

TENDARO DE SOVETIAJ JUNAJ ESPERANTISTOJ

La 16-an de julio ekis kaj dek tagojn daŭris Sovetia Esperantista Junulara Tendaro, SEJT-10, do, jubilea renkontiĝo. Preskaŭ 100 junularaj aktivuloj el 24 lokoj kolektiĝis en Altaja montaro apud Teleckoje-lago por preparoli aktualaĵojn de la junulara Eo-movado kaj interŝanĝi spertojn.

Dum tiu jubilea tendaro okazis Somera Universitato, diskutoj, seminario por gvidantoj, amatoraj koncertoj, komuna kantado, marŝoj tra montaro, ŝipekskursoj sur la lago, karnavalo; kiuj por ĉiam restos en ĉies memoroj.

Pro bonega organizado kaj agrablaj impresoj ĉiuj partoprenintoj ŝuldas dankegojn al la Barnaula Eo-klubo. La venonta SEJT-11 okazos sekvantjare en Ukrainujo.

Raportis s-ro V. Ŝilas.

SPORTO KAJ ESPERANTO

Tre aktivaj estas la junaj esperantistoj de Grekujo. Ĉi tie vi vidas la futbalan teamon de Junulara sekcio de Helena Esperanto-Asocio. Bonan sukceson al tiuj sportemuloj en la lando, kie naskiĝis la olimpiaj ludoj, kunigo de sporto kaj de internacieco.



INTERNACIA GEEDZIĜO

La 6an de septembro 1968 geedziĝis Christian Albert Cnudde kaj Tania Mitrova en Sofio. La internacian geedziĝon (li estas franco, ŝi bulgarino) anoncis karto presita en la franca, bulgara kaj Esperanto.

Christian Cnudde funkcias kiel konstanta tradukanto de la NEJO-komisiono de TEJO. Korajn bondezirojn al la novaj geedzoj.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la oktobran eldonon.

RADIO ROMA. 3-XI, Tra la literaturo; 10-XI, Novaĵoj el Italujo; 17-XI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-XI, Leterkesto; 1-XII, La fama itala aktorino Eleonora Duse; 8-XII, Courmayeur kaj la tunelo sub la Blanka Monto; 15-XII, La itala poeto Giuseppe Giusti; 22-XII, La subakva sporto en Italujo; 29-XII, Kristana mondo. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: S-ro Luigi Minnaja.

RADIO BUDAPEST dissendas sian ĉiutagan programon de 19.30 ĝis 19.45 per ondoj 240 m (1250 kcs), 75.09 m (3995 kcs), 42.25 m (7100 kcs), 41.55 m (7220 kcs), 30.51 m (9833 kcs), 25.19 m (11910 kcs), 19.79 m (15160 kcs), 16.77 m (17890 kcs). Skizo de la programo aperis en la maja numero.

POLA RADIO en Varsovio disaŭdigas en Esperanto tri duonhorajn programojn ĉiutage: de 15.30 ĝis 16.00 per ondoj 31.50 (9525 kcs) kaj 25.34 m (11840 kcs); de 22.30 ĝis 23.00 kaj de 05.30 ĝis 06.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs). La matena programo estas ripeto de la antaŭa vespera programo; la posttagmeza programo estas malsama. Aŭskultantoj estas petataj raporti pri tiuj elsendoj: almenaŭ unu el la tri disaŭdigoj taŭgas al ĉiu! Prospektoj pri elsendoj kaj konkursoj estas sendataj al korespondantoj.

Pacifika atingo

Je 2. sep. 1968 interkontaktis radio-amatoroj Pedro Magaña-Erosa (XE 1 M, Meksiko) kaj Bunnie Chambers kaj Richard Wood (KH 6 GT, Havajo) — ĉiuj delegitoj de UEA. Temas, ŝajne, pri la unua tia kontakto transpacifika. Sur la foto: s-roj Chambers (maldekstre) kaj Wood ĉe sia ensendilo.



Invito por 1969

UEA denove invitas ĉiujn siajn membrojn kaj membrojn de la 54-a Universala Kongreso partopreni la Belartajn Konkursojn. La kompleta, reviziita regularo de la Konkursoj aperis en la Jarlibro 1965/I, p. 132-4. Nepre ĉiuj konkursoj atente tralegu la regularon, precipe la artikolojn 1 kaj 2.

Kiel en la lastaj jaroj, la ĉijaraj branĉoj estas jenaj: 1. Originala poezio; 2. Tradukita poezio; 3. Originala prozo; 4. Originala drameto (por scenejo aŭ por radio).

Ĉiujn konkursaĵojn kun la aldonaj laŭ la regularo oni sendu al la Sekretariino de la Belartaj Konkursoj: s-ino E. Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio. La limdato por ricevo de la konkursaĵoj estas la 31-a de marto 1969.

Preskaŭ 1000 gld. gajneblaj

La valoroj de la premioj estas difinitaj jene: por 1-a premio, 100 gld.; por 2-a premio, 70 gld.; por 3-a premio, 40 gld.; por la premio "Nova Talento", 70 gld. Krome, la nomo de la "Nova Talento" estos engravurita sur la pokalo Henry Harabagiu.

Oni aparte petas, ke konkursantoj, kiuj tradukas verkojn de nemulte konataj aŭtoroj aldonu al la konkursa traduko koncizajn biografiajn-kritikajn notojn pri la aŭtoro. Tiujn notojn oni poste utiligos okaze de eventuala publikigo de la traduko.

MEMORIGA KALENDARO

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago, Libro-Tago
- 27-3/1 Int. Seminario GEJ, Kolonjo
- 27-5/1 Int. Skiferioj, Adelboden, Svis.
- 31 Kotizoj por UK Helsinki plialtiĝas

Januaro

- 2-6 Nov-Zelanda Kongreso, Blenheim

Februaro

- 15-22 Int. Skisemajno, Bischofshofen, Aŭstr.
- 16-22 Semajno de Internacia Amikeco
- 22-1/3 Dua skisemajno, Bischofshofen, Aŭstr.

Marto

- 1-2 Svisa Jarkunveno en Solothurn
- 8 Renkontiĝo ĉe Foiro de Leipzig, Germ.
- 31 Limdato de la Belartaj Konkursoj 1969
Kotizoj por UK Helsinki plialtiĝas

Aprilo

- 4-7 Brita Kongreso en Dublin, Irlando
- 30 Limdato kandidatiĝo Int. Ekzameno

Majo

- 17-18 Dana Kongreso en Århus
- 17-23 IFEF-Kongreso en Avignon, Francujo
- 24-26 Franca-germana Kongreso, Strasbourg

Nova granda donaco Yelland



Ges-roj Yelland
fotitaj en 1964

Ĉirkaŭ 14 000 guldenoj

Tute ekster la promesitaj pruntoj kaj multaj gravaj donacoj por "Kapitalo Hodler '68", pri kiuj vi baldaŭ legos alian artikolon, venis antaŭ nelonge granda donaco al UEA. Gesinjoroj E. E. Yelland en Aspremont (A.M.), Francujo, donacis al UEA obligacion "5% Exchequer Stock", je valoro de proksimume 14 000,— guldenoj.

Iam antaŭe g-roj Yelland faris gravan donacon al UEA. En la jaro 1931 ili aĉetis, favore al UEA, domon en Aspremont, kiun ili nomis "Esperanto" kaj kie en la tridekaj jaroj multaj sciantoj de la Internacia Lingvo ĝuis siajn feriojn. Ĝis 1964 g-roj Yelland loĝis en tiu domo. Kiam en tiu jaro ili deziris transloĝigi, ili proponis al UEA, ke la domo estu vendita kaj la vendoprezco sendita al UEA. Tiel okazis, kaj venis al UEA sumo de 17 000,— guld. Speciala tabulo en la Domo de UEA memorigas pri tiu donaco.

Ekde 1911 g-roj Yelland ĉeestis multajn Universalajn Kongresojn. Ankoraŭ en 1966 ili ambaŭ vizitis la Kongreson en Budapeŝto. De la kongresoj, aliaj internaciaj renkontiĝoj kaj vizitoj al Aspremont ili havas amikojn kaj konatojn en multaj landoj.

Pro troa aĝo, ne plu eblas al g-roj Yelland vojaĝi kaj ĉeesti kongresojn. Nome de la Estraro de UEA, mi kore dankas g-rojn Yelland pro ilia belega donaco kaj deziras al ili, ke ankoraŭ dum jaroj kaj en kiel eble plej bona sanstato ili povu kune ĝui ripozon en la bela Aspremont. Iliaj nomoj estas enskribitaj en la Ora Libro de UEA.

E. J. Woessink,
estrarano pri financoj

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de januaro neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Britujo: Arthur J. L. Hughes, Eunice Hughes, Marjorie Flint, Joseph T. Harris, Dorothy M. Fulford, Frederick John Swan, Anthony Frith, Arthur Jackson, David Kelso, E. Robert Penny, Kenneth McLennan, Russell W. Hamilton, Phyllis Strapps, Eric Revill, Bruno Najbaro, Marjorie C. E. Dodd, Kenneth A. Sly, Abraham Mildwurf, David W. Bisset, William H. Reeves, Arthur G. Plowman, Louis Romania, Esther Watson, Horace J. Clayton, Olive Robotham, Alec Venture. **Francujo:** Jean Duthilleul, Roger Colney, Gay Tatet, Jean Chapellier. **Germanujo:** Anton Kiefer, Roland Galle. **Jugoslavio:**

INTERNACIAJ KONKURSOJ 1968

Stato je la 30-a de septembro 1968

Konkurso I

1	(1)	Jugoslavio	3792	4580	120,78
2	(2)	Italujo	3816	3785	99,19
3	(3)	Japanujo	3829	3665	95,72
4	(4)	Svedujo	6415	6038	94,12
5	(5)	Nederlando	5322	4885	91,79
6	(6)	Danlando	2764	2520	91,17
7	(8)	Usono	4144	3720	89,77
8	(9)	Belgujo	1912	1675	87,60
9	(7)	Britujo	6095	5327	87,40
10	(10)	Germanujo	6579	5500	83,60
11	(15)	Hispanujo	2919	2430	83,24
12	(11)	Francujo	7234	5969	82,51
13	(13)	Svislando	1949	1580	81,07
14	(12)	Finnlando	2608	2105	80,71
15	(14)	Brazilo	3188	2419	75,88

Konkurso II

1	(1)	Grekujo	250	407	162,80
2	(2)	Israelo	488	630	129,10
3	(4)	Kanado	955	1025	107,33
4	(3)	Aŭstrujo	1270	1220	96,06
5	(5)	Sud-Afriko	250	225	90,—
6	(6)	Aŭstralio	1327	1189	89,60
7	(7)	Argentino	693	593	85,57
8	(8)	Norvegujo	1460	1105	75,68
9	(9)	Madagaskaro	250	187	74,80
10	(10)	Islando	250	165	66,—
11	(11)	Nov-Zelando	1265	785	62,06

La Internaciajn Konkursojn partoprenas tiuj landoj, el kiuj oni povas libere aliĝi al UEA. Poentoj estas aljuĝataj laŭ la nombro de membroj, jene: AM = 1; MJ kaj J-MJ = 5; MA, MA-K kaj J-MA = 10; MS = 15; Patrono kaj DM = 50. La kvoto estas la meza poentaro atingita en la lastaj 5 jaroj. Interkrampaj ciferoj indikas la pasintmonatajn poziciojn. Varbu membrojn!

B. Popović, Nikola Predavec. Nederlando: F. van de Oudeweetering. **Svedujo:** Einar Olsson. **Svislando:** Hans Altherr. **Usono:** Louisa H. Schmidt, Richard T. Sandberg, Cecelia Peterson, Robert Swenson, Cornelis L. Zwan, Merrill Jackson, Gretchen Doris.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1968)

Belgujo: Mechelen (VD). **Britujo:** Hexham (FD Edukado), Wakefield. **Bulgarujo:** Karlovo (FD Alpinismo, Turismo), **Danlando:** Odense (FD Turismo). **Francujo:** Neussargues. **Germanujo:** Düsseldorf (FD Aŭtomobil-riparo), Freiburg, Hamburg (FD Bankaj Aferoj), Homburg, Ichenheim, Krefeld (FD Blindulaj aferoj), Tailfingen, Wiedenbrück. **Hindujo:** New Delhi (FD Turismo). **Hispanujo:** Las Palmas de Gran Canaria (FD Komerco). **Hungarujo:** Budapeŝto (FD Kinematografio amatora, Presado, Tekniko), Csopak, Kisujszállás, Nagykörös, Oroszlány, Pápa,

Oficiala informilo

Szentes. **Italujo:** Biella (FD Komerco: teksmaterialoj), Firenze (FD Pentrarto), Genova, Massa (JD), Milano (JD, FD Fabrikado de teksaĵoj), Torino (FD Numismatiko), Udine (VD). **Japanujo:** Hirosima, Hukuoka, Ikeda, Yokosuka. **Jugoslavio:** Koprivnic, Niš, Skopje (D, JD, FD Juro). **Koreujo:** Seoul (FD Metioj). **Madagaskaro:** Miarinarivo. **Nederlando:** Haarlem (VD), Maastricht. **Norvegujo:** Bardu, Mo i Rana. **Nov-Zelando:** Palmerston North (FD Elektrotekniko), Petone, Upper Hutt (D, FD Radio amatora). **Pollando:** Bydgoszcz (FD Medicino), Gdańsk (JD, FD Filatelo, Muziko), Gliwice (D), Kraków (VD, FD Fiziko, Literaturo), Poznań (VD, FD Biokemio, Filatelo), Przemyśl, Sosnowiec (FD Medicino), Zabrze, Zakopane. **Rumanujo:** București (FD Tekniko, Ŝako). **Sovet-Unio:** Rapla Rajoon. **Svedujo:** Borås (FD Arto, Ĵurnalismo), Höje (FD Sociaj Aferoj), Karlstad (FD Librotenado), Kumla (FD Turismo), Kungälv, Leksand. **Svislando:** Genève (VD, FD Industrio), Locarno (D, FD Ĝardenkulturo), St. Gallen, Zürich (FD Grafikarto, Reklamo). **Usono:** Greenfield, Juneau (FD Kosmetikoj), Los Angeles (FD Filatelo), Minneapolis (D, FD Kemio), San Diego (VD Stein, FD Ko-

merco), San Francisco (VD Colt, FD Religio), San Mateo (FD Edukado). **Venezuelo:** Barquisimeto.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Fineberg, s-ro Allan E., Paterson, Usono.
Ribeiro de Cruz, s-ro Antonio, Lisboa, Portugalujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

280 Trarbach, s-ro Armindo, Brazilo. 281 Plowman, s-ro A. G., Britujo. 282 Tónico, s-ro Tomás, Hispanujo. 283 Swenson, s-ro R. A., Usono.

DONACOJ (Gld.)

Ĝenerala Kaso: Aŭstralio: Addis, W., 1,92. Belgujo: de Weerd, s-ro, 2,50. Britujo: Laurie, s-ino W., 1,45. Nederlando: Fortuin, s-ro J., 4,75. Svedujo: Ostelith, s-ro J., 1,60.

Fondaĵo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Britujo: Lapenna, Prof. I., 5 MA; Rytjkov, s-ro N., 1 MA. Finnlando: Väisälä, prof. Y., 2 MA. Nederlando: Nyveld, s-ro W. J., 1 MA; Steffering, f-ino W., 1 J-MJ.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

ANONCETOJ

Tarifo: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

La Esperantista Kolektanto ... reaperas, petu specimenon kaj sendu tekston por senpaga anonco al s-ro R. Melo, 15 rue de la Richelardièr, 42 St. Etienne, Francujo.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, 5594 Strib, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj handikapitojn de tuta mondo. U.I.E.A. estas kunlaboranta fakasocio kun UEA.

Posedantoj de hebrea-esperanta vortareto kaj lernolibro de Gureviĉ, 1890, 38 paĝoj, bonvolu skribi al Holzhaus, 2748 Orchard Lane, Columbus, Indiana, Usono.

Manoel Marques (22-jara fraŭlo), Rua 8 Dezembro 477, casa 3, Vila Isabel, Rio de Janeiro, Brazilo, volas interŝanĝi poŝtkartojn.

Literatura Kajero, la plej nova iniciato de la brazilaj samideanoj, serĉas abonantojn kaj kunlaborantojn. Skribu al Henerik Kocher, Rua Baltazar Lisboa, 34 (ZC - II) Rio de Janeiro GB, Brazilo.

Kiu volas labori kaj lerni en Hamburgo? Bona ŝanco por juna, inteligenta fraŭlino aŭ sinjoro, kiu volas lerni la germanan kaj samtempe gajni monon, laborante en lingvoinstruado. Ĉefo parolas Esperanton. Skribu al Moderner Sprachunterricht, 2 Hamburg 13, Schlüterstr. 18, F.R. Germanujo.

Ĉu iu povas helpi al ĉeĥoslovaka politika fuĝinto, kun lingvoscio nederlanda kaj germana kaj fakaltlerneja klereco, instali propran entreprenon en la fako de metalo? "Kie ajn". Z. Zeman, Admiralsplein 295, Dordrecht, Nederlando.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA, (2427 Padstow Cres., Clarkson, Ont., Kanado), povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi, kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

KORESPONDEMULOJ!

Se vi publikigos korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian **FOTON**. Ĉiunonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por **SENPAGA** aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

SENPAĜE

konu la mondon.

"PASPORTO"

Peresperanta Internacia Hominterŝanĝo por Individuoj kaj Familioj
Oficiala Programo de TEJO (Junulara Sekcio de UEA)
Gastigantoj en 21 landoj. La nombro kreskas ĉiutage.

PARTOPRENU KIEL GASTIGANTO

Nova tute presita broŝuro (n-ro 2) kun raportoj de gastoj kaj gastigantoj
senpage havebla de:

D-ro Rubén Feldman-González

Bv. Oroño 866 "A"

ROSARIO, Argentino.

Ni utiligu Esperanton.

"La popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian"

Oni skribis pri

KAŬKAZAJ RAKONTOJ

"Ĉi tiuj rakontoj estas ĝuo por la amatoroj de streĉaj aventuroj, sed ankaŭ de bela prozo, ĉar Lermontov, giganto de la rusa poezio, estas ankaŭ majstro de la prozo, kaj feliĉe la traduko de D. Staritsky estas ne nur fidela, sed ankaŭ vigla kaj bonstila."

Michel Duc-Goninaz en Heroldo

"Kvankam la rakonto estas strikta, dinamika kaj tute ne enuiga, oni bezonas trankvilan horon, se oni vere volas ĝui ĝin en ĉiuj nuancoj. Kaj tio, ŝajnas al mi, estas signo, ke temas pri 'klasikaĵo'."

Stefan Maul en Germana Esperanto-Revuo

"Turnante la lastan paĝon oni pensas bedaŭre: 'ha! jam finita!', kio estas laŭ mi la plej bona — kaj por esperantlingva verko malofta — komplimento."

G. L. en SAT-Amikaro

Prezo (kun alloga moderna bindaĵo): 5,— gld.

Jus aperis en eldono de UEA nova

FOTO-POŝTKARTO

kun portreto de la iniciatinto de Esperanto

D-RO L. L. ZAMENHOF

La portreto estas fotografajo lastatempe re-
trovita kaj, ŝajne, antaŭe nekonata. Konvena
kiel nov-jara salutkartoj.

Formato: 90 × 140 mm. Prezo: po 0,30 gld.
(1,2 steloj), plus afranko 10%. Mendu ĉe la
Libroservo de UEA.

POR LA JARFINA SEZONO

Serio de 6 bondezirokartoj "MONDFAMAJ
PENTRAĴOJ" (Rembrandt, Da Vinci, Breughel,
Renoir, Van Gogh, Utrillo), duoblaj kartoj,
kun kovertoj.

Prezo: 3,75 gld.; 15 steloj

Serio de diversaj Novjarkartoj "ORA JAR-
CENTO HOLANDA" (Rembrandt k.a.), poŝt-
kartoj.

Prezo: 1,50 gld., 6 steloj

Mendu tuj ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe
Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

La Centra Oficejo de UEA serĉas

JUNAN HOMON

por la ofico de

KONSTANTA KONGRESA SEKRETARIO

La kandidatoj devas posedi bazan scion pri librotenado, devas bone prezentigi (por rilatoj i.a. kun oficialaj instancoj) kaj devas povi eklabori en la unuaj monatoj de 1969 (prefere ĉirkaŭ aprilo) por plene transpreni la oficon en aŭgusto 1969.

Sinproponojn, kun kompletaj informoj pri aĝo, scio de diversaj lingvoj, ĝisnunaj oficoj kaj studoj, dezirata salajro ktp., oni direktu al:

La Direktoro,
Centra Oficejo de UEA,
Nieuwe Binnenweg 176,
ROTTERDAM-2, Nederlando

Sendante jarfinajn donacojn aŭ salutkartojn,

ornamu viajn sendaĵojn

per la bela trikolora glumarko de la

Jaro de Homaj Rajtoj 1968



La alloga desegno ora-oranĝa-malhelblua portas la sloganon: POR LA INTERNACIA LINGVO — KONTRAŬ LINGVA DISKRIMINACIO.

Mendu tuj por ne malfrui !

Prezo: po 0,50 gld. (2 st.) por 10 markoj, plus afranko 10 %. Eldonis: UEA.

La Monda Lingvo-Problemo

SOCIA-LINGVISTIKA-PSIKOLOGIA-EKONOMIKA-JURA-POLITIKA

Redakta Komitato: C. J. Adcock, G. Bárczi, C. C. Berg, E. A. Bokarev, A. Capell, V. Georgiev, Z. Klemensiewicz, I. Lapenna, B. Migliorini, M. Pei, G. Waringhien, E. Wüster.

Redaktoro: V. Sadler

Vol. I

Jan. 1969

N-ro 1

(Aperos la 10-an de decembro 1968)

VICTOR SADLER

Editorial.

IVO LAPENNA

La situation juridique des "langues officielles" avant la fondation des Nations Unies.

ARTHUR CAPELL

The limits of second language learning.

J. B. RUDNYCKYJ

Linguizid; Ein Beitrag zur Soziolinguistik.

M. VAN HAEGENDOREN

La origins of the language shift in Flanders.

THÉODORE GUTMANS

L'interprète de conférence dans le monde moderne.

R. L. HARRY

The language problem in diplomacy.

Ampleksaj resumoj en Esperanto

Eldonas:

Mouton & K-io, Hago-Parizo.

Sub aŭspicio de CED.

Peranto: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando; pĉk. 37 89 64.
Jarabono (unua jarkolekto 1969: 3 x 64 paĝoj): 25 gld.; \$ 7; £ 2.18.0; Fr. Fr. 34; DM 28.